



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencej.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 115 (Ninth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 Januaro 1930.

AN IMPORTANT ANNOUNCEMENT.

Replying on the 27th November, 1929, to an enquiry made by the New Zealand Esperanto Association regarding the teaching of Esperanto by departmental teachers to children of the primary schools outside of ordinary school hours, the Director of Education, Wellington, N.Z., stated:—

"I have to acknowledge receipt of your memorandum of the 22nd inst. and in reply have to say that, subject to the by-laws of the Education Board, a teacher might form in his school an Esperanto class for his pupils out of school hours. Of course, attendance at such a class would be subject to the approval of the pupils' parents.

"Subject also to the by-laws of the Board, the school may be used out of school hours, on such terms as the Committee (School) may prescribe."

The position as outlined by the Director of Education must be regarded as most satisfactory. It now appears to be a comparatively easy matter for Esperantist teachers to form an Esperanto class in their respective schools, out of school hours. Fourteen teachers have enrolled as members of the N.Z.E.A. Are we to have 14 classes?

FIRST NEW ZEALAND ESPERANTO CONGRESS.

A Mark of Progress.

The First New Zealand Esperanto Congress has been arranged to take place, under the auspices of the New Zealand Esperanto Association, at Wellington on the 17th and 18th of January.

An attractive and utilitarian congress programme has been provided, as is reflected in the following outline:—

Friday, 17th January.—2 p.m.: Formal opening of congress and N.Z.E.A. business session. Even-

ing: Propaganda meeting.

Saturday, 18th January.—Forenoon: Free. Afternoon: Sightseeing tour. Evening: Social and supper; formal closing of congress.

The primary object of the congress is to propagate and to prove to the public that Esperanto is advancing in the Dominion. In addition, the N.Z.E.A. past and future activities will be reviewed; and Esperantists will be afforded opportunities of meeting each other and using the language of Zamenhof. The advent of the congress raises Esperanto to a point never previously reached in the Dominion, and the event should be an epoch-making one in the history of the movement in New Zealand. Although arranged at short notice, the gathering at Wellington, it is anticipated, will be an outstanding success, and merely a forerunner to larger things.

Christchurch, Novzelando. — Ferion ĝis Februaro la loka Societo ĝuos post la 9a de Dec-o. Bone meritita post laboro-plena kaj sukcesa jaro! Ankaŭ ĉesos pro la sama kaŭzo la "Stela Rondo" (Infana Klaso).

S-ro N. Bell, M.A. denove parolis de radioje 3YA je la 19a de Nov-o. Li pritraktis Esp-gramatikon.

La fina amikec-vespero estis aranĝita ĉe la domo de nia prezidanto, s-ro Bell, M.A., je la 26a de Nov-o, kiam la ĉeestantoj ricevis pluan okazon uzi praktike nian lingvon.

Wellington, N.Z.—Sub aŭspicioj de la Nov-zelanda Esperanto-Asocio, la Unua N.Z. Esperanto-Kongreso okazos en tiu ĉi urbo dum la 17-18a de Jan-o, (vidu aliloke raporton angle). Per la kongreso, helpata de la gazetaro, oni esperas efike propagandi la lingvon tra la Dominio, samtempe provizi ĝuodonan kaj riĉan programon al la partoprenantoj.

POR KOMENCAĴOJ.

Iu kamparano havis kun la najbaro grandan malpacon, kiu daŭris jam dum multaj jaroj. La najbaro ne plu volis toleri la ĉikanojn de la kamparano kaj tial li minacis, ke li la aferon transdonos al la juĝisto. Ĉar la kamparano konsciis, ke li estas malprava, li timis la juĝiston kaj tial volis la aferon lerte eviti. Li iris al la urbo kaj vizitis tie faman advokaton. Al li la kamparano ĉion rakontis. „Kara amiko“, diris la advokato, „via afero estas tre malfacila, ĉar vi ne estas prava, sed se vi al mi pagos mil ŝilingojn, mi al vi helpos.“ La kamparano konsentis kaj la advokato donis al li la konsilon, ke li dum la proceso nenion respondu krom „Ho, ho!“, kion ajn oni demandos. Venis la tago de la proceso. Juĝisto demandis: „Kial vi ĉikanas vian najbaron?“ „Ho, ho!“ „Kial vi ŝtelis lian kaprinon?“ „Ho, ho!“ Kial vi mortigis lian hundon, surpaŝis lian kampon, pelis viajn kokinojn en lian ĝardenon?“ „Ho, ho, ho, ho, ho, ho!“ „Do respondu precize!“ „Ho, ho!“ Post longa sensukcesa demandado diris la juĝisto: „Vi vidas, ke la kamparano estas freneza kaj tial mi devas lin liberigi.“ Kun granda ĝojo iris la kamparano al la hejmo. Unu tagon post la proceso venis la advokato, kiu tiel bone konsilis al la kamparano, por la rekompenco. „Kara sinjoro, mi iras por la mil ŝilingoj.“ „Ho, ho!“ „Do mi petas, donu al mi la sumon!“ „Ho, ho!“ „Memoru, ke nur mia konsilo helpis al vi en tiu por vi malfavora afero!“ „Ho, ho!“ „Pro dio, kompatu min, donu al mi la monon“, plendis jam la advokato. „Ho, ho!“ „Mi vidas, ke vi estas tute impertinenta fripono!“ „Ho, ho!“ Kolere foriris la advokato sen mono kaj aŭdis post si la malican rĵadon de la kamparano. Tiel trompis la ruza kamparano la faman advokaton, ĉar tiu ĉi donis al li trompan konsilon.

La amo estas neniel ligita kun la intelekto. En juna virino ni amas aferojn tute aliajn ol la intelekton: ni amas ŝian belecon, ŝian petolemon, konfidemon, karakteron, ŝiajn malperfektaĵojn, ŝiajn kapricojn, kaj Dio scias, kion plu, kio ne estas eldirebla. Sed ni ne amas ŝian intelekton. Ni ŝatas ĝin, se ĝi estas brila, kaj per ĝi junulino multe povas pligrandigi sian valoron antaŭ niaj okuloj. La intelekto eble ankaŭ taŭgas, por katene

fiksi nin, kiam ni jam ekamis. Sed la intelekto ne kapablas entuziasmiĝi kaj veki en ni pasion.

—Goethe—

EN GREKUJO.

Estas nun du ĉefaj centroj de E-movado: en Areno (de 1 jaro 1924) kaj en Saloniko (de 1 jaro 1928).—Antaŭ tiu tempo estis la E-movado tre malforta. En la jaro 1926, estis refondita „Helena E-Asocio“, kies oficiala organo estas „Lingvo internacia“ kun tekstoj greka kaj esperanta.—Esperanto estas instruata en grekaj element-kaj mez-lernejoj, en komercaj lernejoj kaj eĉ en vesperaj universitataj kursoj lingvaj. Ankaŭ la gazetaro greka favore traktas E-on kaj multe helpas al ĝia propagando.—Ĉefulo de E-movado en Grekujo estas Dro Anakreon Stamatiadis, diligenta E-verkisto.—Ankaŭ skoltas en Ateno havas sian kurson kaj universitataj studentoj fondis sian „Studentan E-Grupon“.—En Saloniko gvidas E-movadon J. Spatharis, prez-o de Salonika Esperanto-Societo.—Ankaŭ en multaj aliaj urboj ekzistas vico da viglaj batalantoj por nia lingvo.

**IU MOTORO POR FUNKCI
BEZONAS BENZINON. VIA OR-
GANO POR PROSPERI BEZONAS
KOTIZON. ĈU VI PAGIS LA
VIAN? SE NE..... DORMU MAL-
TRANKVILE.....**

Edzo: Ankoraŭ nova robo! Kiel mi pagos por tio?

Edzino: Mi ne scias. Mi estas edzino, ne financa konsilistino.

Mia edzino estas angelino.

Vi estas tre bonŝanca. La mia ankoraŭ vivas.

LA MARO.

La maro estas la plej granda el ĉiuj tombejoj, kaj la tieaj endormuloj dormas sen monumentoj.

Ĉiuj aliaj tombejoj, en ĉiuj landoj, montras ian signon de diferencigo inter la granduloj kaj la malgranduloj, la riĉuloj kaj la malriĉuloj; sed en la oceana tombejo la reĝo kaj la krudulo, la princo kaj la kamparano estas egale honorataj.

Super ĉiuj ruliĝos la samaj ondoj; per la kanto de la oceano la sama rekviemo estas farata je ilia honoro.

Mantell.

MAPO DE ITALUJO.

Ni ricevis de la Esperanto-Turisma Servo, Vicenza, Via Burci 5, Italujo, belan landkarton dulingvan kun la loknomoj de urboj, en kiuj troviĝas UEA delegitoj. Taŭgas ĝi bone por murdekoracio utila. Sendota kontraŭ pago de 10 liroj. Ankaŭ mapo de Eŭropo kun platglobo k kongresurboj, 10 liroj, aŭ la du haveblaj por 15 liroj.

A POINT OF COMPLAINT.

It is regretted that voices complaining of certain abbreviations used in S.K. have reached the Redakcio. A word of explanation may be appreciated by readers. Apart from the limited use of "k" for "kaj," a practice followed by several German and Russian Esp. gazettes, and an occasional shortening of frequently occurring words in stereotyped contexts, such as "lern." for "lernantoj(n)," we have had but little recourse to that word-clipping and use of other truncating devices that characterise any living language.

In book reviews, or language notes, such a form as "AFGHIR" after, say, "sport," means that the root is found in the "angla, franca, germana, hispana, itala, kaj rusa" languages. The use of "O.K.L." "F.K." etc., for "Oficiala Klasika Libro," "Fundamenta Krestomatio" and other works was fully explained in the first "notaro" printed in this paper.

We hasten, however, to give assurance that henceforth there will be no ground for further complaint on this score.—Red.

AL NIAJ SUBTENANTOJ—KAJ LA ALIAJ.

Dankante al la fideluloj pro la jenaj abonpagoj ni devas firme altiri atenton de ankoraŭ nepagantoj al la terure mallonga listeto ĉi-suba. Indiferentuloj sciu, ke ili respondecas pri tre grava afero, nome, la daŭra aperado de la **ununura ligilo** inter la Esperantistoj en la suda duonsfero monda, La Suda Kruco. Ili vekigu el sia morta letargio! S-ino O'Leary, 4/6 nov. '29; s-ino Purnell (pro d-ro B.) 9/- dec., '30; L. Illingworth, 4/6, dec., '30; f-ino Tricker 2/- dec., '29; W. Waterman 4/6, junio, '31; s-ino Trundle 4/-, nov., '30.

QUERY CORNER AND CORRESPONDENCE.

Under this head are invited questions on Esperanto history and language. Contributions in the form of short articles, verselets, sketches, etc., are appreciated.

Domagi: The root contains the ideas

"antaŭbedaŭri, ne voli elspezi, ne voli perdi, ne voli difekti, ne voli ĉagreni (dolorigi) la sentojn aŭ aĵojn de alia persono." Do not use it in the sense of "damage" (difekti). See Millidge. F.K. 68/17, "La imperiestro, domaĝante ŝian riĉan veston..." (not wanting to have her dress spoiled). Ham. 109/11. 2 Kor. ix, 7, 2 Sam. 12/4. The root is also used in translating the English "What a pity!" (Kia domaĝo!), Ham. 51/18, 19. Kabe.

Bubo in M. "Flamvorta Alvoko" leaves us cold.

B. in A. S. K. goes to Japan, and to some 15 other countries.

To All: There will be no translation by Mr. Gordon in Jan. number, owing to holidays.

Volgo in B. "Jen vi havas!" (La Revizoro 5/12, 99/1) is not a literal translation of the Russian, which means "Here's a St. George's day for you, old woman!" This is a very common expression, referring ironically to an unpleasant surprise, for on St. George's Day, 1648, the serfs were deprived of the right of migration. In English it means, "There you are!", "Here's a go!", Now you're in for it!" and so on.

B. in Tam. What difference is there between "laborilo nia" and "nia laborilo"?

The word-order in Esperanto is not absolutely free, but compared with those of national tongues it is almost so. Compare the difference between "tute ne" and "ne tute." If I say of our society that "nia laborilo estas la amo," I mean that love is our sole, or at least our chief, instrument of, or motive for labor. But if I say that "laborilo nia estas la amo," I then convey the meaning that love is one of a number of instruments at our disposal.

RUSA ANEKDOTO.

Maljuna vilaĝano ĵus venis al la urbo kaj ekveturis en sia ĉaro tra la ĉefstrato. Deĵoranta policano tuj baris al li la vojon, ĉar ne estis permesate, ke krudaj kamparanaj veturiloj aperu en la belaj urbaj stratoj. Por esti pli impona, la severa ordogardisto maldelike traktis la kamparanon, eĉ kelkfoje pugnobotante lin.

— Malsaĝulo! — ekkriis la atakita maljunulo, — ĉu ne estas vi, kiu precipe devus prizorgi la ĝentilecon?

La policano konsideris sin ofendita kaj vokis la ofendinton al tribunalo. Venis la tago de l' juĝo. La proceso komenciĝas.

— Juĝato, ĉu vi konfesas vian kulpon? — alparolas juĝisto la vokiton.

— Pri kio do? — tiu rediras.

— Nu, ĉar publike vi nomis la plendanton per ofenda vorto "malsaĝulo".

— Ha! do, ĉu mi ne rajtas ajnan individuon opinii malsaĝa, se ĝuste tiela en realeco ĝi estas?

— Certe vi tion rajtas opinii, tamen laŭte elparoli ĝin estas tute alia afero, kiun malpermesas nia leĝo, — edife komentas la juĝisto.

— En tiu okazo, sinjoro juĝisto, mi pentas pri mia kulpo kaj mi petas de la plendanto pardonon, ĉar neniel mi supozis pri ekzisto de simila leĝo.

Sekvas interpaciĝo de la procesantoj, kaj la juĝisto anoncas, ke la juĝato povas foriri.

— Sed antaŭ ol foriri, — la maljunulo reparolas neatendite, — estu permesate al mi peti de vi iun klarigon.

— Vi povas, — sekvis la konsenta respondo.

— Por ke mi ne estu devigata refoje viziti la tribunalon pro nescio pri la leĝoj, bonvolu informi min pri jeno: se eventuale mi renkontos nun iun veran malsaĝulon, ĉu almenaŭ mi rajtos nomi lin saĝulo?

— Ho, tute senriske, ĉar tio neniel kontraŭas nian leĝaron.

— Do vi kuraĝigas min per via kompetenta klarigo kaj tial mi dankeme adiaŭas vin, respekttega saĝulo...

—Arbeiter-Esperantist.

PRAKTIKO DE ESPERANTO.

Fragmento el la libro Hector Hodler, lia vivo kaj lia verko, eldonita de Universala E-Asocio, Geneve.

Ekzistas Esperantistoj, kiuj opinias, ke Esperanto estos venkinta, kiam per registara dekreto ĝi estos devige instruata en la ĉiulandaj lernejoj. Ili konsideras la tutan problemon nur el tiu vidpunkto. Nu, tio tute ne sufiĉas. Se samtempe kun la instruado en la lernejoj, oni ne aranĝas praktikajn servojn, per kiuj la lernintoj povos tuj utiligi la ĵus akiritan scion, oni atingos mizeran rezultaton. En ĉiuj gimnazioj de la mondo oni nuntempe instruas la latinan lingvon. Praktike ĝi estas senutila, krom al la kleruloj sin okupantaj pri filologio, al la katolikaj pastroj kaj... al la profesoroj de latina lingvo. Ĉar la lernintoj ne havas la okazon ĝin uzi, ili forgesas ĝin kelkan tempon post la eliro el la gimnazio. Certe, la latina lingvo estas multe pli malfacila ol Esperanto, sed oni aliparte dediĉas al ĝia studado multe pli da tempo. En la mezepoko la latina lingvo ne estis pli facila ol nun; tamen preskaŭ ĉiuj intelektuloj uzis ĝin, skribis en ĝi siajn verkojn,

parolis ĝin. Nuntempe oni ĝin instruas al pli multaj homoj ol antaŭe, sed ĝi estas multe malpli utila. Tio montras, ke ne sufiĉas instrui lingvon en la lernejoj, por ke ĝi estu vivanta lingvo, praktike uzata.

La klopodoj por instigi al la uzado de la lingvo estas do ne malpli gravaj ol la propagando. Al la vorto „uzado“, oni kompreneble ne devas doni tro mallarĝan, nek tro materian sencon. Spirita utileco ne estas malpli ŝatinda ol materia. Al la turisto, kiu uzas ĝin dum vojaĝo eksterlande, Esperanto estas utila; ĝi estas utila al la komercisto, kiu per ĝi trovas novajn klientojn, sed tio estas nur la plej konkretaj kazoj. Esperanto estas ankaŭ utila al la persono, kiu per ĝi korespondas kun eksterlandanoj kaj tiamaniere plivastigas sian spiritan horizonton, ekkonas fremdajn morojn, kondiĉojn, ideojn; ĝi estas utila ankaŭ al tiu, kiu ŝatante la lingvon mem, tradukas en ĝin kaj tiel pliakrigas sian lingvosenton kaj pliriĉigas siajn kapablojn. Esperanto ja multmaniere povas esti utila, sed tiun utilecon ĝian oni devas sentigi al la varbitoj kaj pligrandigi. Ni konstante devas serĉi, kiel oni povas igi nian lingvon pli lerninda, ĉar pli utila.

ESPERANTO, A LITERARY LANGUAGE.

The international language must possess all the resources of the national tongues. It must meet satisfactorily all claims made upon it. Of Esperanto we may then say, either it is fitted to clothe every conceivable thought, or it is not a living language. The civilised man uses a speech-medium from which has been moulded a multi-varied literature; the I.L. must be, in such potentialities, as rich as any national language, or all of them.

A language is not formed of different blocks of words or phrases readily distinguishable as belonging to this or that section of human society. We do not, in reality, detach from the main vocabulary a commercial sub-language, a scientific sub-language, a literary sub-language, all three devoid of commonly used forms. The classification into common, commercial, scientific and literary has relation to what is only a very small number of words, expressions and phrase constructions proper to this or that special calling. One would find hardly 100 words or expressions that could be designated, for instance, as wholly commercial, and science uses only a relatively

meagre terminology. On the other hand, does a very marked difference exist between the language of the street and that of literature? Omitting some few words and constructions peculiar to poetry and exalted prose, do we not find that the content of the two is the same? One could easily cite many a page deemed to be of literary value which presents perhaps only ten words unused by the people. This is even truer of French than English, for in the former, owing to its relatively limited vocabulary, the distinction between *le style noble* and *le style familier* is less strongly marked than in the latter. French cleaves closer to the parent Latin, words from which are more readily popularised, and are free from that slightly pedantic flavor that clings to the same roots in English.

So, if the I.L. possesses the clarity, precision and flexibility necessary to express fittingly our every-day needs and impressions, there it little need to fear that it will fail to meet the claims of literature, which is much less specialised than most people believe. It is difficult to understand the attitude of those who hold that Esperanto is an excellent medium for all but literature.

Apart from the nature of the thought, which depends on the writer or speaker, the literary power of any language is found in its elements and in their arrangement. Now, are not the elements of Esperanto those of the national tongues, or rather those chosen elements that have become the common property of the leading civilisations? Does their nature change, or do they lose something of their literary value, when transplanted to Esperanto soil?

It has been said that the rule of using the logical and precise expression, a rigid rule in Esperanto, must necessarily render language deficient in color and life; that it must impart to language the plainness of a physiognomy having no character of its own. Now, we will not grant that looseness of terminology is an absolute condition of color and life in literary style. We were taught the contrary principle. Besides, does not common sense inform us that a loose, imprecise or untrue expression detracts not only from its expressiveness, but also in great measure from its beauty? If by eliminating idiom and using logical forms of expression the physiognomy of a language loses its peculiar properties to the point of becoming colorless and insipid, then it must be confessed

that English ceases to be English, and no longer possesses literary charm when it displaces loose idiom in favor of precise forms of expression, as it is constantly doing. Color and energy in style are not dependent on the use of idioms, much less in the use of imprecise words; a composition free from idiom can be much more vivid than one in which idioms swarm, and the peculiar physiognomy, the special genius of a language, is not to be traced to such. Esperanto is the only tongue which, as it were, takes its orders from logic alone. Expression in it is not constantly hindered, as in other tongues, by strange or rigid word order and by the caprices of custom. Comparison, hyperbole, metaphor, original arrangement, a wisely free word order, are rights exercised by it when use of such would result in clear and faithful presentation of ideas. This being so, can Esperanto be other than a literary language?

The many translations and original pieces in Esperanto prove beyond doubt that the idioms of national tongues can be translated under a form comprehensible to all peoples, in such a way as to leave untouched the strength or beauty of the authors' thought.

In Hamleto, in The Iliad, in Boris Goudonov, in La Edziĝo de Figaro (Beaumarchais), Alegorioj el la Naturo (Gatty), Fabiola (Wiseman), in For la Batalilojn (von Suttner), in La Faraono (Prus), in La Vendetta (Balzac), in Petro Schlemihl (Chamisso) and many others is presented to the world a rich mine of idiom from the world's culture tongues so translated that the most sceptical must surely be convinced. Such a confession was made by a professor of English, who had held that an I.L. was impossible. Being compelled to acknowledge the existence of Esperanto, he sought refuge in what he claimed to be the incapacity of an artificial language to express subtle thought-nuances. His argument lay chiefly in idiom. "Never," said he, "could Esperanto be a satisfactory medium for the translating of a masterpiece." He learnt the language, and began to read Zamenhof's translation of Hamlet. He admitted that his only aim was to find means to justify his attitude to Esperanto. He read the English original, checking it with the Esperanto translation, certain that he would note defects at every page. Great, therefore, was his surprise when he felt himself forced to

the conclusion that the translation was not only a faithful rendering, but in an incredibly successful degree had appropriated the color and richness of the original. After a detailed examination of other texts of Shakespeare, he voiced his conviction that Esperanto filled the literary role at least as well as any national tongue. It brings to its task, as each of them does, its own marked genius. The fact that its literary character is logical and precise in no way renders it weak and vapid.

Esperanto possesses the richness, flexibility, precision and euphony for the full expression of ideas in the worlds of commerce, science and everyday life, and now bids fair to carve for itself no mean niche in the Temple of Literature. The facts revealed in the 40 years' history of the language warrant one in believing that it is an instrument capable of meeting any demand that any hitherto unexplored field of inquiry may make upon it. For it is, in truth, the living language of a living people.

—(ROBO, after an essay by de Beaufront.)

ERARO: Linio 14 de "Insula ĝardeno Edena" (p.128) "prospektivo" (devas esti, "perspektivo").

AUSTRALIA.

A GENERAL ACCOUNT

(G. S. Browne, M.A.: Nelson, Publishers)..

In looking over the above book the avid reader of Esperanto-literature will perhaps be moved to inquire mentally concerning the reception accorded a similar publication of last year, an original piece of Esperanto with the title "Aŭstralio, Lando kaj Popolo." Just how far have orders from Australian samideanoj pushed up the sale-cipher of this brightly produced volume from the enterprising printery of Ferd. Hirt, Leipzig?

But let it pass. The Australian has here in English a complete yet concise treatment of all the characteristics of his country and the multifarious activity of them that people it—a compendium of facts geographical, industrial, social, educational, historical. The book is richly illustrated with well-chosen photographs and four colored plates, and the author is to be congratulated on the pointed eloquence he has imparted to his carefully arranged statistics.

The design of this notice, however, is primarily to interest the "correspond-

ing" Esperantist, who must for long have felt the need for such an aid. With this book at his elbow there will be for him no more irritating lapses into abstracted pen-chewing, no more vague fumbblings through cumbersome tomes at the reference library, for he will have within reach a source of wealth, for all practical purposes inexhaustable, wherewith to satisfy the questionings of the most studious young German, "preparing a thesis on Australia for his doctorate."

The pithily written chapters on the aborigines and on social life, translated into Esperanto, would make informative reading for the non-English-speaking Esperantist.

Price 3/6, at Wayfarer's Bookshop, Exhibition-st, Melb.

POINTS IN THE ADVANCE.

We have learned since last issue—That war literature's best seller, "All Quiet on the Western Front," is on sale in Esperanto dress through "Heroldo de Esp-o," Brussellerstr., Koln, at 5s. and 7s.

That the State of Lichtenstein has issued official p. cards with Esperanto text.

ABOUT S.A.T.

Many an Esperantist feels himself far from the political or sociological convictions of La Sennacia Asocio Tutmonda (S.A.T.) (The Universal Non-National Association), but it is impossible for him to ignore its existence and increasing gravity in the Esperanto movement. It has just closed its 9th world congress, in Leipzig. Although 1102 persons paid their congress fees, through various hindrances only 662, from 22 different lands, actually took part. Needless to say, Esperanto was the sole language used in the sittings. The next congress will be held in London, August 1930.

From the year-report we learn that on 1st July, 1929, there were 5336 members. Its book co-operative has published 33 works in 90,000 copies, all told. Of these in 1927-28 more than 15,000 were sold, and in 1928-29 almost 18,000. The Esperanto reader, "Petro," was the best seller with 6,300 in 1928-29. The value of books sold in that year was about L655. S.A.T.'s weekly Esperanto organ, "Sennaciulo," has about 4000 subscribers. The "Complete Esperanto Dictionary" (entirely in Esp-o) will leave their co-operative, it is hoped, at the end of the year. It is printed up to F inc., that is, 120 pages. 1428 copies, value about L427, have been pre-ordered.

INTERNAĈIA KANTARO.

La "Internacia Kantaro" de Paul Bennemann, eld. de Ferd. Hirt (Leipzig) estas unika en sia speco k pro amplekso k pro laŭnacia reprezenteco. Kantulaj rondoj en Esp-ujo nun subtenu tiun entreprenon, aĉetante ĉi-kolekton riĉevastan, pliŝvelan je 78 novaj kantoj ol la malnova eldono. Inter alie, aldoniĝis strofaroj el la java, jida, maoria kantotrezoro, entute la vortoj de 139 orekkaresaj arioj de 55 popoloj, krom 7 Esp-aj k 3 koncertarioj. En sia "antaŭparolo al la 16-20 milo" la kompilinto korpetas ĉiuj Esp-muzikfakulon ekinterrilatiĝu kun li por celo plenkompleti la kantarono ĝis vera universaleco; precipe li volas helpojn el landoj ankoraŭ ne sin esprimantaj en lia kolekto.

Estas vere mirige, ke la nomo de s-ro Bennemann kiel tut- aŭ kuntradukinto sidas ĉepiede de pli ol 30 kantoj, ĉiu eltirita el malsama lingvo, inter ili strofoj el la malmulte de eŭropanoj scipovataj japana, hina, maoria, java! Kvankam ni nek volas nek povas aserti, ke ne estas plenkorekta la tradukaĵo el multaj lingvoj nur de unu homo, ni tamen sugestius, ke la "internacieco" de la enhavo povus esti eĉ pli frape almontrata se la koncernaj tradukintoj estus samlingvaj kiel la kantaŭtoroj. Sed tion oni ne tro rimarku: verŝajne s-ro B. ne sukcesis trovi tiom da kunlaborantoj, kiom li serĉis, spite kion li ja elmetis meritan verketon. Ĝi estu spirita agordilo inter la vaste semata samcelanaro, ĉe kiu ĝi trovu tujan debiton. Gravrimarke—la muzika parto aĉetebligos post ne longe. Mendu ĉe AEA. Teksto, prezo 1½ ŝil.—(Robo)

ANSTATAŬA EDZINO.

(a wife by proxy) de Erica Maxwell
ANONCO DE "HEROLDO DE
ESPERANTO."

Ĉi tiu romano, tradukita el la angla lingvo, estas tre moderna kaj streĉas la intereson de la leganto de la komenco ĝis la fino. Ĝia scenejo estas Ruslando, Anglujo, la oceano kaj Aŭstralio.

Erica Maxwell (pseŭdonimo de s-ino Lillian M. Pyke), kiu mortis en 1927, estis fervora amikino de Esperanto, kiu

aktive helpis nian movadon. En ŝia ĝardeno en Melbourne (Viktorio, Aŭstralio) ofte kunvenis aro da gesamideanoj. En diversaj verkoj kaj gazetartikoloj ŝi propagandis Esperanton, kaj en la supre nomita romano donas al nia lingvo eĉ gravan rolon.

Bofrato de s-ino Lillian M. Pyke, s-ro G. Pyke estas fervora samideano, Li estas ankaŭ bone konata al eŭropaj esperantistoj pro tio, ke li vizitis kelkajn universaliajn Esperanto-kongresojn. Krom tio li verkis kelkfoje „Leteron el Aŭstralio" por Heroldo.

La romano estas tradukata de angla samideanino s-ino M. Sampson. La granda pliparto estas jam tradukita; mankas nur kelkaj ĉapitroj. Do, post nelonge ni povos komenci la publikigon. Ni esperas, ke la nova romano plaĉos al niaj legantoj kaj, precipe, ankaŭ al niaj legantinoj.

—Redakcio de "Heroldo."

KRONIKO.

PERTH, Okc. Aŭst.—Diskutante pri kongrese ni konstatas ke Esp-o en O.A. pliviglas rezulte de propagando farita ĉe la ĉefurba kongreso.

F-ino Barclay baldaŭ forlasos Perthon por tramonda vojaĝo; adiaŭonte anojn ŝi invitis ilin ĉeesti sian domon.

Tri grupoj funkcias ĉe kunvenoj de la „Westralian Esp-o Society", gvidataj de s-ro Unwin, Saar k Byatt. Studema spirito troviĝas ĉi-grupe. S-ro Dunn lekciis pri Esp-o k Bahaismo, kiu lasta rigardas nian lingvon kiel unu el ĝia celaro.

Nia energia sek-iino klopodas starigi bibliotekon, k antaŭdankas tiujn, kiuj donacos bv. E-librojn.

Brisbano (Kvinslando-Queensland).

—La jarkunveno de la societo havis lokon en 26 nov. sub prezido de f-ino Rose Macpherson. Alestis malmultaj anoj: jen pruvo de kontenteco pri la administrado de la societo dum la pasinta jaro. La sek-io (f-ino Carrick) prezentis la jarraporton, kiu montris moderan progreson kaj bonan financon situation. Tion ĉi la societo aparte ŝuldas al sia sindona kaj laborema sek-iino.

Oni elektis novan estraron: la listo

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun domas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

aperas sur la lasta paĝo de ĉi tiu numero.

Propaganda parolo de s-ro W. L. Baker antaŭ unu klubo de Metodista Eklezio en la kvartalo Lutwyche.

Parolo pri vojaĝo, kun lumbildoj, en la kunveno de la societo, de s-ro Hyde. La kliŝojn kaj la projekcian lanternon la societo ŝuldas al la afabla prunteco de s-ro A. McLeod.

KONIGU NIAN LINGVON.

Unu simpla kaj efika propaganda metodo, kiun oni uzas en Brisbano, meritas esti uzata en aliaj lokoj. La Esperanto-societo proponis al la Regna Biblioteko, kaj al la bibliotekoj de "School of Arts" kaj Laborista Eduka Asocio (WEA) tutjaran abonon al la revuo "International Language," kondiĉe, ke tiuj institucioj konservu la revuon en sia publika legoĉambro inter la aliaj revuoj, kiujn ili ricevas. Oni akceptis la proponon, kaj kun malmulta penado la societo tenas la aferon de Esperanto antaŭ la atento de konsiderinda sekcio de la legema publiko, kiu estas por ni vere la plej grava sekcio de la popolo.

Nur Esperanto-grupoj, sed ankaŭ izolaj samideanoj, povus same fari en sia urbo aŭ urbeto. La kosto de "International Language" estas nur 2ŝ 6p. jare; ĝi enhavas gravan propagandan materialon en Angla lingvo; kaj unu simpla abono efike donas rek-lamon por nia lingvo dum tuta jaro.

GRUPFONDO ĈE COBURG.

Danke helpojn k subtenon de ĉi-tica filio de la Aŭstralia Laborista Partio k la ŝtata lernejo (n-ro 484) nova E-ta grupo estas fondita en Coburg (antaŭurbo de Melbourne). Kiam ni petis de la ALP okupadon de ilia ĉambrego ili tre kompleze tion jesis. Sed pro tio, ke ankaŭ loĝioj ktp jam luis la ĉambregon ni povis ĝin uzi nur ĉiun duan jaŭdon. La unua kunveno okazis la 12an de sep-o, k inter aliaj bonekonataj E-tistoj ĉeestis s-ino k s-ro Rawson, kiu lasta fariis trafilan alparolon pri la historio k progreso de E-to. Komence de okt-o ni an-kalkulis 30 lern., kiuj, sentante deziron pli ofte kunveniĝi, faris peton al la komitato de loka ŝtatlerno por grupejo. Senhezite ĉi tion ili disponigis al ni. La grupo funkcias senkoteze. Ni dankas s-ron Perkins, de Melb. E-Klubo, pro lia valora helpo kiel instruanto, k s-ino Hintze (samkluba), kiu de tempo al tempo presigis lokjurnale raportojn pri nia progreso, pro tio gajnante kelkajn novajn lernu-

lojn. Por pluinformo sin turnu al la gvidanto, Geo. Burns, 1 Bourke-st, Coburg, Vic.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikajojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FB EA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.